

Esperanto kaj UN

Informilo de la oficejo de UEA por rilatoj kun Unuiĝintaj Nacioj

Numero 77, julio-aŭgusto 2025



Universala Esperanto-Asocio

La Studogrupo pri Lingvoj kaj UN traktis “multikrizon”

“Geopolitika Nestabilo kaj la Valoro de Multlingvismo” estis la temo de la nunjara Simpozio de la Studogrupo pri Lingvoj kaj Unuiĝintaj Nacioj, kiu okazis virtuale la 13-an de junio. La simpozio, kiu distance arigis ducenton da fakuloj pri lingva komunikado ĝenerale kaj la problemoj de translingva komunikado specife, fokusiĝis je la rolo kiun ludas multlingvismo en multflankismo, paco, kaj komuna kompreniĝo, precipe en periodo de mondpolitika krizado.

Inter partoprenantoj en la simpozio estis stabanoj de UN, registaraj funkciuloj, universitataj fakuloj, kaj anoj de civila socio. Ĉefparolanto estis Lia Ekscelenco Michel Xavier Biang, Konstanta Observanto de la Internacia Organizo de la Frankofonio (t.e. francparolantaj landoj) al Unuiĝintaj Nacioj.

La simpozio havis kvar partojn – pri multlingva edukado, teknologio kaj lingvaj servoj, la rolo de civila socio, kaj tutmondaj komunikrimedoj.

La prezentoj estis bone fokusitaj kaj la diskutado estis vivoplena. Kiel priskribis la aferon unu partoprenanto: “Tro ofte, ni fokusiĝas malvaste je *celoj* kaj neglektas la gravecon de *rimedoj*. La lingvo, finfine, estas la plej fundamenta kaj inkluziva inter la rimedoj bezonataj por tutmonde engaĝi registarajn kaj civilsociajn organizojn en frontado de terglobaj problemoj. Ĝi postulas nian atenton se ni entute volas engaĝi la enloĝantaron de la mondo por alfronti la problemojn de la mondo.”

La simpozio okazis sub aŭspicio de la Komitato de NROj pri Lingvoj, kies prezidanto, profesoro Francis M. Hult (University of Maryland Baltimore County), estas unu el la reprezentantoj de Universala Esperanto-Asocio al Unuiĝintaj Nacioj. Aliaj personoj inter la organizantoj estis prof. Lisa McEntee-Atalianis (Birkbeck University of London), d-ro Carol Benson (sendependa esploristo, Usono), prof. Rosemary Salomone (St. John’s University School of Law, Usono), kaj la gvidanto de la Studogrupo emerita prof. Humphrey Tonkin (University of Hartford, Usono).

Inter la sponsoraj organizoj estis la Centro por Aplika Lingvistiko (Center for Applied Linguistics) kaj Esperantic Studies Foundation.

Okaze de la Internacia Tago de Espero, UEA proponas sian fortan subtenon

La ideo de “espero” estas enskribita eĉ en la nomo de la Internacia Lingvo Esperanto kaj konsistigas gvidan principon de la laboro de UEA. La Asocio do ĝojegis kiam, en januaro 2025, la Ĝenerala Asembleo de UN fiksas la 12-an de julio kiel Internacian Tagon de Espero. UEA estis inter la unuaj civilsociaj organizoj kiuj esprimis sian subtenon. Kiel klarigis UN: “En mondo kiu frontas kreskantan maltrankvilon, vastiĝantajn sociajn dividojn, kaj persistajn ekonomiajn kaj naturmediajn defiojn, la tutmonda komunumo plue serĉadas valorojn kiuj unuigas anstataŭ disdividii. Inter tiuj, la espero elstartas kiel profunde potenca kaj universala resona forto. Rekonante tiun fakton, la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj fiksas la 12-an de julio kiel la Internacian Tagon de Espero – tagon por festi kaj antaŭenigi la esperon kiel gvidan principon de individuoj, komunumoj kaj nacioj.”

En speciala mesaĝo por festi la unuan Internacian Tagon de Espero, UEA skribis: “Kiel implicas ĝia nomo, la Internacia Lingvo Esperanto naskiĝis kaj plue vivas en etoso de espero – la kredo de juna kuracisto, Ludoviko Zamenhof, ke ekzistas alia vojo ol eterna militado, ke eblas kunvivi en paco. Zamenhof kreis internacian lingvon, kiu celis nutri esperon en ĉiuj popoloj pri alia vojo ol militoj, persekutoj, pogromoj, kaj persista malamo.”

Plue deklaris la mesaĝo de UEA, “Milionoj da homoj lernis Esperanton: hodiaŭ Esperanto estas konata kaj uzata de individuoj tra la tuta mondo. Tiuj homoj nutras esperon pri mondo kie interhoma komunikado reduktu kaj fine estingu la malfidon kaj batalemon kultivitajn de tro multaj homoj hodiaŭ.”

La mesaĝo emfazis, ke la celo de la speciala tago estas agado: “La Ĝenerala Asembleo, per sia decido, bonvenigis ‘agadojn kiuj celas regule mobilizi la klopodojn de la internacia komunumo por antaŭenigi bonfarton, cele al disvastigo de espero kaj plialtigo de paco, tolero kaj socia stabilo, respekto de diverseco kaj reciproka respekto.’ ”

“Universala Esperanto-Asocio, kaj la Esperanto-komunumo kiel tuto, bonvenigas tiujn iniciatojn kaj faros sian eblon, kunlabore kun la cetero de civila socio, ne nur festi la Tagon de Espero, sed teni la flamon de Espero vivanta kaj brilanta tra la tuta jaro kaj en estontajn jarojn.”

Kiel atentigas UN, “Finfine, ĉi tiu tago estas memorigo, ke eĉ en malfacilaj tagoj, la espero restas transformipova forto. Ĝi kapablas transponti dividojn, stimuli progreson, kaj altigi la homan spiriton. La Internacia Tago de Espero invitas nin ĉiujn, ke ni paŭzu, pensu, kaj ree aliĝu al estonteco konstruita ne sur senesperon aŭ disdividadon, sed sur komunan homecon kaj la senŝancelan kredon je morgaŭo pli hela.”